

sub la suda kruco ★
decembro 2013

ESPERANTO



Nov-Zelanda Esperanta
Kongreso, Aŭklando,
15-21 Januaro, 2014



Aŭstralia Somerkursaro
kaj Kongreso, Kanbero,
3-12 Januaro, 2014

ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIIOJ

Volumo 21 [3] numero 114 decembro 2013

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio
Redaktoroj: Kam Lee kaj David Ryan
Kontaktadreso | esk2@esperanto.org.au

P.O. Box 1097
Bendigo Central Vic 3552
Australia

Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto Sub la Suda Krucio estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA | www.esperanto.org.au – info@esperanto.org.au
NZEa | www.esperanto.org.nz – exec@esperanto.org.nz

Kiel kontribui al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia oficiala kontaktadreso, "esk2@esperanto.org.au".

Limdato por kontribuoj por la sekva numero

15-a de februaro 2014

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj
en ĉi eldonaĵo respondecas la aŭtoroj.
Ili ne necese spegulas la opiniojn
aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright © 2013 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj

ISSN 1038-9380

Sur la kovrilo: Supre: Loko apud la kongresejo de la Universala Kongreso*

Malsupre: Emblemoj por la Kongreso de NZAE kaj Somerkursaro kaj Kongreso de AEA.

Sur la malantaŭa kovrilo: supre: Kongresejo de la Universala Kongreso, Rejkjaviko, Islando, 2013*

Malsupre: Blua Laguno (Bláa Lónið), Islando*

* Fotita de Sandor Monostori

5

Kial junuloj ne plu protestas?



6

Lingva Festivalo en Adelajdo

8

Legendo de la kokosarbo



10

**La unua Indonezia
Esperanto-kongreso**



12

Simileco inter Esperanto kaj la Maoria Lingvo



14

Kakatuoj en Tri Lingvoj



16

La Malapero de la Bankizoj



18

**Universala Kongreso de Esperanto en
Islando**



24

**Birdoj en mia
Ĝardeno**



27

**Referendumo
de AEA**

Decembro, du mil dektri

Antaŭparolo


Ni havas krizon en la redakta fako! Ni ne scias kion opinias niaj legantoj pri ESK. Ĉu ĝi plaĉas al vi? Kiajn artikolojn vi trovas plej interesaj, aŭ tute ne interesaj? Ĉu vi volas legi pli pri movadaj novaĵoj aŭ pli pri aliaj diversaj temoj, ekzemple pri koaloj aŭ tertremoj en Nov-Zelando?

Diru al ni! Skribu al esk2@esperanto.org.au por doni vian opinion. ESK estas VIA revuo kaj ni volas ke ĝi estu interesa por vi.

Samtempe, sendu al ni viajn kontribuojn. Ne gravas la temo, aŭ se vi skribas pri taŭga temo en la angla. Se viaj kontribuoj ne venos, ESK pli kaj pli devos maldikiĝi. Ek al verkado!

Intertempe, kion vi opinias pri jena ideo? Kiam mi feris kun mia familio en Gold Coast antaŭ kelkaj monatoj mi volis trovi restoracion aŭ kaftrinkejon kun senpaga sendrata interreta aliro (wifi en la angla). Mi serĉis per mia poŝtelefono kaj aperis detaloj en la jena foto. Imagu se oni povos fari similan serĉon per poŝtelefono por trovi lokajn esperantistojn, klubojn, aŭ Z-ejojn! Ĉu bona ideo?

Bildo 2: Jen reklamo ekster fizikoterapiejo en Lower Hutt (apud Wellington). Rimarku la frazeton "piediri". Ni ne ofte vidas reklamojn aŭ indikilojn en Esperanto kaj ni ne konas la posedanton de ĉi tiu fizikoterapiejo. Tamen, estas bone vidi uzon de Esperanto, ĉu ne?



Bildo 1: Imagu povi serĉi lokajn esperantistojn per poŝtelefono



Kial junuloj ne plu protestas?

La Rondo de Wellington lastatempe konversaciis pri tre interesaj kaj paroligaj temoj. Dum kunveno ni demandis kial estis tiom da elstaraj protestantoj en la 70-aj jaroj, ekzemple kontraŭ nuklea armado, sed nuntempe studentoj kaj aliaj junuloj ne tiel ofte protestas surstrate?

Eble ili ankoraŭ protestas sed pere de la Interreto kaj precipe per blogoj. En Nov-Zelando estas dekoj da blogpaĝoj kie oni esprimas opinion pri politikaj aferoj. Nuntempe nuklea malarmado ne estas tiel diskutata afero, sed protekto de la medio estas pli grava afero. Antaŭe oni esprimis opinion marŝante laŭ ĉefa strato de granda urbo kriante laŭtvoĉe. Nun oni faras tion en interreta strato kaj tio plej efikas ĉar miloj da homoj povas aŭ protesti aŭ aŭskulti alies proteston hejme antaŭ komputilo. Oni uzas ankaŭ Twitter-mesaĝojn. Mi povas facile sendi Twitter-mesaĝon nun, ekzemple: 'Mi protestas kontraŭ registaro. Mi ne volas pagi impostojn'. Post nur sekundo miloj da homoj povas legi mian proteston kaj reagi.

Eble oni ne plu protestas ĉar protestantoj nun havas oficialajn reprezentantojn en la Parlamento. Nov-Zelando antaŭe havis nur du ĉefajn partiojn. Nun estas reprezentantoj kaj sendependuloj de naŭ partioj. La Verda Partio havas reprezentantojn en la Parlamento. Antaŭe Verduloj protestis surstrate; nun ili protestas en la Parlamento (kaj eble post nacia baloto je la fino de la venonta

jaro Verduloj formas parton de nova registaro).

Eble junuloj kaj studentoj ne plu protestas ĉar ili estas tro okupataj. Nun pro la fakto ke ili devas pagi siajn universitatajn studojn (antaŭ 25 jaroj ili pagis preskaŭ nenion) ili devas labori parttempe kaj ili ne emas pasigi sian liberan tagon en protesto sub pluvplena ĉielo. Aŭ ili estas okupataj antaŭ komputilo en Facebook, YouTube ktp.

Iomete pli pri Twitter kaj aliaj elektronikaj metodoj: ĉu ili estas danĝeraj por nia lerteco? Nuntempe ni ĝenerale pli informiĝas ĉar ni ĉiuj portas poŝtelefonon aŭ uzas komputilon kaj, se ni volas, ni facile povas informiĝi la tutan tagon. Tamen, ĉu ni informiĝas pri faktoj aŭ pri opinioj? Per Twitter oni diras ekzemple 'Tiu politikisto estas stulta'. Tamen, ĉu tio estas serioza afero? Antaŭ multaj jaroj politikaj partioj eldonis faktplenajn broŝurojn kun siaj pensoj, planoj, kaj politikoj. Nuntempe ili mesaĝas pri bagatelaĵoj, aŭ ĵurnalistoj demandas 'La ĉefministro volas fari ion. Kion vi diras?' kaj la respondo estas 'La ĉefministro estas stultulo. Se mi estus ĉefministro mi farus ion pli bonan'. Nun tiu dek-sekunda 'sonpeco' sufiĉas. Bedaŭrinde tiaj opinioj, bagatelaĵoj, sonpecoj, mesaĝoj ktp atakas nin 24 horojn tage sed ni ne multon lernas pri seriozaj aferoj.

Malfeliĉe niaj infanoj kreskas en mondo de multegaj informiloj sed ili scias malpli. Ili alkitimiĝas al bagatelaĵoj kaj serioza debato pri temoj

Twitter:
ĉu danĝero
al nia lerta
socio?



ne plu ekzistas. Ĉu ni kulpas? Ĉu niaj junuloj ne protestas aŭ aktivas politike ĉar gepatroj ne plu parolas al ili pri seriozaj, polititaj aferoj? Kiam lastatempe vi parolis kun viaj infanoj aŭ nepoj pri tiaj aferoj? Eble nun flankenmetu ĉi tiun numeron de ESK, telefonvoku al via filo aŭ nepo kaj faru demandon, ekzemple: ĉu kapitalismo estas bona sistemo? Verŝajne via filo/nepo ne respondos. Eble pli efike sendu Twitter-mesaĝon por komuniki kun viaj amatoj!

Lingva Festivalo en Adelajdo

De Katja Steele

La 20-a de junio estas Internacia Tago de Rifuĝintoj, kio bone taŭgas por okazigi Lingvan Festivalon (LF). En la pasinta jaro Sandor Horvath entreprenis organizi LF en sia laborloko kun milo da studentoj, Thebarton Senior College. La aranĝo estis sukcesa. Uzante la unuajn spertojn kaj aldonante tiujn el la ĉi-jara Sidneja festivalo, Sandor okazigis en Thebarton la duan LF. Granda parto de liaj studentoj estas enmigrintoj (kaj ankaŭ rifuĝintoj), kies nepra tasko estas lerni la anglan. Ni faris demandojn al Sandor pri la LK.

1) Kiam vi komencis la organizadon?

Do, mi jam havis la sperton de la lastjara evento. Tial, la serioza organizado komenciĝis nur du monatojn antaŭ la evento.

2) Kompare kun la pasinta jaro kiujn ŝanĝojn vi enkondukis?

En 2012 ĉio okazis en la gimnastikejo. Tre bona etoso, sed unu



Bildo 1:
Atentema
aŭskultanto



Bildo 2:
Studentoj
ĉeestas la
Esperanto-
prezentajn.

prezentado ĝenis la alian kaj homoj multe moviĝis inter la ok ekranoj.

Ĉi-jare ni dividis la programon en du partojn. En la unua estis la prelego de prof. Ghil'ad Zuckermann kaj la prezentado de la araba, hazaraga, kaj persa lingvoj. Ili estas la tri plej multe reprezentataj lingvoj en mia lernejo. 350 studentoj kaj instruistoj aŭskultis.

Posttagmeze okazis la prezento de 30 aliaj lingvoj en dek diversaj klasĉambroj. Ghil'ad Zuckermann, profesoro de la Universitato de Sud-Aŭstralio, estis la festparolanto ankaŭ pasintjare.

3) Pri kio li parolis ĉi-foje?

Li prezentis prelegon kun la titolo: Ne forgesu vian gepatran lingvon. Kiel kutime, ĝi estis tre amuza kaj interesa.

4) Kio estis la plej malfacila parto de la preparoj?

Konvinki la studentojn ke ili prezentu iliajn lingvojn.

5) Por tiom granda tasko estus bone havi teamon de kunlaborantoj. Kiuj helpis vin?

Kelkaj instruistoj iomete helpis, sed plejparte mi laboris sola.

6) Kiom da studentoj partoprenis la festivalon?

Proksimume 500.

7) Kiel reagis pri la aranĝo viaj kolegoj?

Sufiĉe pozitive. Multaj

raportis ke la prezentantoj vere fieris pri iliaj lingvoj.

La Esperanto-prezentaĵon faris Antonia Uguet Guasch el Hispanio (Katalunio). Ŝi estis taŭga, malgraŭ la fakto ke la lingvon ŝi lernis ĝis nun nur dum kelkaj horoj. La de ŝi prezentita materialo estis bone elektita. La montro de eroj el la Chaplin-filmo "La diktatoro" (kie aperas E-surskriboj) certe estis atentokapta.

8) La studentoj mem povis elekti ĉeesti 3 el la 30 lingvoj. Kiuj estis la plej popularaj?

La hispana, ĉina, kaj ujgura.

9) Ĉu la amaskomunikiloj atentis pri la aranĝo?

Ne, do preskaŭ ne. La lernejestro estis intervjuita matene ĉe radiostacio. Li respondis al la demando: Kion faras via lernejo por la "Internacia Tago de Rifuĝintoj?".



Bildo 3: Antonia Uguet Guasch kun diplomo kiun ŝi ricevis de la lernejo pro ŝia prezentado de Esperanto.

Hina - aŭ la legendo de la kokosarbo

Legendo de Noumea
tradukita de la Esperanto-grupo en
Nov-Kaledonio

Same kiel la plimulto de la legendoj, tiu ĉi antaŭ tre longe naskiĝis en la tahitia distrikto Papara. Tiuepoke loĝis en tiu distrikto brunsilkhaŭta junulino kun grandaj nigraj okuloj. Ŝi nomiĝis Hina. Laŭtradicie kiam Hina iĝis deksesjara, ŝia patro, la distriktestro, decidis elekti por ŝi edzon.

Post kelkaj semajnoj li vokis ŝin, kaj tiel alparolis al ŝi: "Finfine mi trovis vian ontan edzon. Kiel vi scias, laŭ tradicio vi konatiĝos kun li nur la geedziĝotagon. Sciu ke via onta edzo estas princo, sed speciala princo, nome duone homa, duone angila". Poste, la patro montris al sia filino grandorelan monstron, duone homan, duone angilan, kaj tri metrojn alta.

Ege timigite Hina alfuĝis montaren, kaj atingis la domon de

la dio Hiro revenanta el kaptado de fiŝo, blindumigita pro la lumo aŭreolanta lian branĉokabanon. Temis pri la brilega lumo aŭreolanta la hararon de Hina, tiom brilegan pro tanĝanta sunradio sur ĝi. La junulino rakontis sian terure timigan aventuron al la dio, kiu konsentis ŝin kaŝi kelktempe.

Sed la angilo, ankaŭ logita pro la junulina brila hararo, baldaŭ alvenis al la dia branĉokabano. Per fortega ununura svingo de sia fortega vosto, ĝi enbreĉis la rifon. La dio Hiro, alarmita, deprenis longan haron de Hina, sur ĝin ligis perlamotan fiŝhokon kaj tiele kaptis la monstron. Post kvazaŭa taŭrobatalo kontraŭ ĝi, li marborde distranĉis ĝin en tri pecojn. La kapo falis al la piedoj de la junulino, dirante al ŝi: "Ĉiuj homoj kiuj malamegas min - unualoke vi Hina-iam por danki al mi, surbuŝe kisos min. Mi estas mortanta sed mia antaŭdiraĵo ja ĉiamas."

Hiro urĝe envolvis la kapon per bananujaj folioj kaj donis ĝin al

Bildo 1: Diversaj mienoj de la kokosoj.



Hina. “Hina, belfilino, reiru nun al viaj samklananoj, kaj tie fordetrui tiun kapon. Sed dumvojire ne demetu ĝin teren ĉar la angila malbeno realiĝus. Kaj Hina kun siaj akompanantaj servantinoj donacitaj de la dio repaŝis hejmen. Sed longa estis la vojaĝo, kaj la suno brulvarma. Ili alvenis sur la riverbordon. La malvarmeta kaj kristalpura akvo allogis la junulinojn, kiuj decidis sin bani.

Forgesante la dian konsilon, Hina demetis sian pakaĵon teren por baniĝi kun siaj akompanantinoj.

Tujtuje obtuzbrue la tero malfermiĝis kaj enfaŭkigis la kapon de la mortinta angilo....Kaj subite elŝprucante el tiu fendego jam fermiĝanta, ekaperis arbo tuj kreskanta, kreskanta senĉese, senmezure. Ĝi estis strange tuttrunka kun ĉeverta folitufo,

kvazaŭ grandega, kap-al-sune staranta angilo.

Jen, la unua kokosarbo ĵus naskiĝis. La malobeintan Hinan la dioj kondamnis al apudrivera vivo kaj la arbo tabuiĝis. Estis absolute malpermesite al iu ajn alproksimiĝi al ĝi kaj manĝi ĝiajn fruktojn.

Pasis multaj jaroj. Pro akre severa sekeco, nutraĵoj kaj trinkebla akvo malaperis. Nur la kokosarbo efike defiis la sunon kaj, spite la malpermeson de la dioj, la homoj plukis ĝiajn fruktojn enhavantajn klaran kaj milde sukeritan akvon. Ili konstatis ke ĉiu frukto ampleksa kiel dika melono surhavis tri malhelajn makulojn kiuj aspektas kiel okuloj kaj buŝo... kaj por trinki oni devis surmeti la lipojn sur tiun lignan desegnaĵon.

Kaj Hina agis same kiel la aliaj, ne konscie ke la profetaĵo ĵus realiĝis.

Bildo 2: Estas sunbrila tago en Nov-Kaledonio. Membroj de loka grupo kaj en la fono kelkaj kokosarboj. Nov-Kaledonio troviĝas je 1 210 kilometroj oriente de Aŭstralio kaj havas areon de 18 600 kvadrataj kilometroj kaj loĝantaron de proksimume 250 000. La ĉefurbo de la franca teritorio estas Noumea. La latitudo de la loko estas 21.5 gradojn sude (simila al Mackay, Kvinslando, kiu estas je 21.1 gradoj sude, kaj 970 km norde de Brisbano).



La unua Indonezia Esperanto-Kongreso

Sandor Horvath

Kune kun 5 aliaj aŭstralianoj, mi havis la ŝancon partopreni la unuan Esperanto kongreson en Bogor, sur insulo Javo.

Alvenante en Jakarto, mi tuj “miris” je la nekredebla trafikŝtopiĝo. Busoj, motocikloj, aŭtoj, ĉaroj ... ĉiuj volas preni la limigitan spacon sur la stratoj. Por la 20 kilometroj de la flughaveno Soekarno–Hatta al la urbocentro, mi bezonis preskaŭ du horojn kaj eĉ la ŝoforo de mia taksio havis grandan malfacilaĵojn trovi mian loĝejon.

La kongreso mem okazis en bela ejo, ĉirkaŭata de ĝardenoj, arboj, kaj artefaritaj riveretoj, iomete ekster Bogor. Partoprenis ĉirkaŭ 50 indonezianoj kaj 20 eksterlandanoj, 10 el Japanio, 6 el Aŭstralio kaj kelkaj aliaj azianoj kaj eŭropanoj. Dum la



Bildo 1: Sandor sidas kun esperantistoj dum la kongreso.



Bildo 2: Sandor salutas la aŭdantaron dum la kongreso.

Bildo 3: Kongresejo



Bildo 4:
Indonezia tradicia
danco dum
malferma
ceremonio



lastaj 4-5 jaroj Heidi Goes faris grandegan kaj mirindan laboron por revigligi la movadon en tiu lando kun 240 milionoj da loĝantoj. (Baldaŭ UEA eldonos ŝian libron pri la historio de la Esperanto-movado en Indonezio!)

Ĉefe junuloj el 6-8 diversaj lokoj de la lando donis multe da energio kaj ĝojo al la evento. Ankaŭ tri Esperanto-veteranoj partoprenis. Ili bone atestis ke Indonezio havis viglan movadon ĝis 1965. Mi sentis privilegion atesti la momenton kiam la unua membro oficiale aliĝis al la ĵus fondita IEA (Indonezia Esperanto-Asocio).

La turista libro “Lonely Planet” diras ke estas malfacile ami Jakarton. Tamen post 6 tagoj la komenca ĥaoso jam ne ŝajnis tiel ĥaosa kaj eĉ mi trovis kelkajn belajn, pacajn oazojn, kie oni estas for de la ĝenerala, senĉesa frenezo.

La estraro de AEA kaj la Melburna klubo decidis inviti po unu esperantiston el Indonezio al nia venonta evento en Kanbero en januaro kaj ni komencis konsideri komunan eventon en Bali en 2015.

Bildo 7: Esperantistoj plejmulte el Aŭstralio staras dum grupfoto en la kongresejo.



Bildo 5: Sandor estas intervjuita en radiostacio “Voice of Indonesia”



Bildo 6: Kelkaj esperantistoj faras prezentadon.



Simileco inter Esperanto kaj la maoria lingvo

Chris Krägeloh, Prezidanto de NZEA, estas docento en la psikologia fako ĉe Auckland Universitato de Teknologio. Li kunverkis artikolon pri la temo **Leksika pligrandiĝo kaj terminologia planado en indiĝenaj kaj planitaj lingvoj: komparoj inter la maoria lingvo kaj Esperanto** kun Tia Neha de la Universitato de Otago en Dunedin. La artikolo baldaŭ aperos en la ĵurnalo *Language Problems & Language Planning*. Intertempe, jen resumo de la verko.

La evoluigo de novaj terminoj estas grava parto de lingva planado. Fakte, tie la malsimilecoj inter planitaj lingvoj kiel Esperanto kaj etnaj lingvoj estas multe pli malgrandaj. Aparte indiĝenaj kaj endanĝeritaj lingvoj kiel la maoria (en Nov-Zelando oni ĝenerale nomas ĝin 'Te Reo' ('la lingvo') aŭ 'Te Reo Māori') dependas de lingva planado por sia pludaŭriĝo kaj pro tio konscia terminologia planado ofte troveblas. La artikolo komparas la terminologiajn principojn kutime aplikatajn en la kreado de novaj terminoj en la maoria kaj Esperanto. Diversaj preferoj por interndevenaj (krei novajn vortojn uzante ekzistajn vortojn de la lingvo) kontraŭ eksterdevenaj (pruntepreni novajn radikojn de aliaj lingvoj) manieroj por krei novajn vortojn estigas konflikton en ambaŭ lingvaj komunumoj

respondante al la devoj de funkciado en modernaj kaj internaciaj terenoj. Daŭra sukceso en terminologia planado estas realigebla nur per pli ampleksa apliko de principoj de terminologia scienco por ke oni pli efiku en la kreado de adekvataj terminoj kiuj daŭre akceptatos ene de la lingvaj komunumoj.

Por niaj legantoj ekster Nov-Zelando, jen kelkaj faktoj kaj opinioj pri la maoria lingvo:

- Estas tri oficialaj lingvoj en Nov-Zelando: angla, maoria, kaj gestlingvo por surduloj. La gestlingvo ne estas vaste uzata, sed post la teruraj tertremoj en Christchurch ofte aperis dum publikaj eventoj interpretisto de gestlingvo.

- La registaro nun anoncas la rezultojn de la oficiala popolnombro kiu okazis pli frue en 2013. Maorioj konsistigis 15% de la tutlanda loĝantaro. Tamen, malpli ol kvarono de maorioj povis konversacii en la maoria lingvo. Plej ofte maljunuloj parolas la lingvon.

- Kiam alvenis britoj al Nov-Zelando en la 19-a jarcento, ili preskaŭ detruis la maorian lingvon. La britoj volis 'eŭropanigi' maoriojn kaj, pro tio, ili ne permesis ke infanoj parolu la maorian lingvon en la lernejo. Poste, pro ĝenerala migrado de maorioj al urboj kaj aliaj kialoj, la uzo de la maoria lingvo malpliigis.

- Dum la 80-aj jaroj, kiam la maoria lingvo estis preskaŭ morta, okazis

renaskiĝo de la lingvo, kaj oni deklaris la maorian oficiala lingvo en 1987. Granda sukceso estis la kreo de 'kōhanga reo' (lingvo-nestoj) por junaj infanoj kie oni instruas en la maoria lingvo. Dank'al tiuj lingvo-nestoj kaj aliaj ŝanĝoj la lingvo komencis revivi. Kompare kun antaŭ 30 jaroj, nun estas televidkanalo kaj radiostacioj en la maoria lingvo, oni uzas ĝin en la Parlamento kaj tribunaloj, lernejoj kaj universitatoj instruas en la maoria, la registaro kelkfoje faras anoncojn en la maoria, kaj eĉ Google havas maorian version ktp.

- En nia ĉiutaga vivo oni uzas maoriajn vortojn aŭ esprimojn. Ekzemple, oni ofte aŭdas 'kia ora', kio volas diri 'bonan tagon'. En novaĵprogramoj en la televido aŭ radio, oni ofte salutas en la maoria lingvo. Ni kutime uzas vortojn kiel, ekzemple, hui (kunveno), utu (venĝo), kōha (mondonaco), puku (granda ventro), haka (fama danco/kanto de la All Blacks), kai (manĝaĵoj), kaj oni uzas maoriajn nomojn por multaj indiĝenaj bestoj aŭ plantoj, ekzemple kiwi. Kiam oni volas demandi pri raso, ofta respondo por 'blankulo' estas Pākehā (vorto por ne-maoriaj homoj).

- Tamen, malgraŭ lastatempa progreso, certe eblas vivi en Nov-Zelando en nur-angla etoso. Scipovo de la maoria lingvo vere ne estas necesa en laboro,

Ekzemplo de la uzo de la maoria lingvo en Nov-Zelando

edukado, aŭ politikaj aferoj. Kelkfoje esti dulingva estas avantaĝo, sed ne ofte. La registaro strebas por ke ĉiuj nov-zelandoj (maorioj kaj aliaj) lernu la lingvon, kaj ĝenerale ne mankas mono aŭ rimedoj. Tamen, ofte ne estas granda sukceso. Antaŭe oni kantis la nacian himnon nur en la angla; nuntempe oni kantas ĝin preskaŭ ĉiam en la du lingvoj. Oni ĝenerale laŭte kantas la version en la angla, sed mulmultaj scias kanti la maorian version.

- Fakte, scipovo de la ĉina aŭ aliaj aziaj lingvoj estas pli granda avantaĝo en Nov-Zelando. Bankoj kaj aliaj firmaoj ofte reklamas en aziaj lingvoj ĉar estas grandaj grupoj de enmigrintoj kiuj ankoraŭ parolas sian denaskan lingvon, kaj kelkaj fakte ne parolas la anglan. Male, maorioj kiuj parolas la maorian ankaŭ bone parolas la anglan.

- La maoria lingvo certe ne mortis, kaj ŝajnas ke ĝi ne mortos. Uzo de la maoria nun estas akceptata, kaj oni strebas por plivastigi ĝian uzon, sed ofte tiu uzo estas nur simbola. Ni povas saluti per kelkaj maoriaj vortoj aŭ kalkuli ĝis 10 en la maoria, sed poste la angla regas.



Kakatuoj en Tri Lingvoj

Trevor Steele, intervjuita
de Katja Steele

Trevor Steele, vi verkis ĝis nun 13 librojn (9 romanojn). *La unua el ili, Sed nur fragmento, aperis en 1987.*

1) Ĉu vi konsciis ke vi verkas jam pli ol kvaronjarcenton?

Mi verkis *Sed nur fragmento* jam en la fruaj 1980-aj jaroj, kaj eĉ post ĝia apero mi tre malmulton sciis pri la pozitiva akcepto ĉar tiutempe, en la antaŭ-interreta epoko, aŭstralianoj estis izolitaj de la landoj kie Esperanto estas plej konata. Nur en 1992 mi ree verkis, spronite de Herbert Mayer, la direktoro de la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno kaj posedanto de la eldonejo "Pro Esperanto". Ĉar ĉiu nova romano dum la verkado dominas miajn pensojn, mi ne konscias kiom da jaroj mi jam verkadis.

2) Kiam aperis via unua anglalingva romano?

Jen tikla afero. *No Butterflies in Bergen-Belsen* aperis en 1998 ĉe Minerva Press. Tamen, Minerva montriĝis fraŭda kompanio, kiu vivis nur de la kontribuoj de aŭtoroj, kaj presis nur kelkajn ekzemplerojn kaj ne provis vendi grandskale. Necesos do ree eldonigi la libron ĉe honesta kompanio.

3) La franclingva eldono de *Flugi kun kakatuoj* estas la plej nova aldono al viaj verkoj kaj per sia ekesto ankaŭ tre speciala. En 2010 vi turneis tra Francio.

sed nur fragmento

Trevor Steele



Bildo 1: "Sed nur fragmento"
dua eldono, 2012, eldonita
de Fonto

Trevor Steele



**Flugi
kun
kakatuoj**

Bildo 2: "Flugi kun kakatuoj",
Esperanta eldono, eldonita
de Flandra Esperanto-Ligo
en 2010

Ĉu tio estis la sparko kiu rezultigis la libron?

Estis kontentige ke foje pli da ne-esperantistoj aŭskultis miajn prelegojn ol da esperantistoj. Evidente la temo de aŭstraliaj aborigenoj interesas francojn. Probable pro tio teamo da francaj esperantistoj gvidata de Ginette Martin decidis francigi la verkon. La laboro daŭris multajn monatojn ĉar necesis unuecigi la stilon, vortelekton ktp.


4) *Preskaŭ samtempe kun la apero de via franclingva verko venis informo pri alia sukceso: Flugi kun kakatuoj estis voĉdonita de la legantoj de Literatura Foiro “libro de la jaro 2012”.*

Estis agrable ekscii pri la favora elekto de la voĉdonantoj ĉar decidis la legantoj, ne iu ĵurio. Plaĉas al aŭtoro se ĵurio ŝatas lian verkon, sed eĉ pli se la legantoj ĝenerale ĝin laŭdas.

5) *Kaj kio estas la plej freŝa verko de T.Steele?*

Mi ĵus verkis 80 000-vortan aŭtobiografion en la angla por literatura konkurso. Baldaŭ mi esperantigos ĝin. Tiu verko metis min antaŭ eble nekutiman problemon. Se oni uzas multajn aŭtobiografiajn detalojn en fikciaj verkoj, oni emas “miksi la kartojn”, do modifi, aldoni, ellasi. Kiam oni verkas nefikciaĵon necesas memori kio estis aŭtoro “adapto” kaj kio vere okazis!

Trarigardon pri la verkoj de Trevor donas:
<http://esperantowebdesign.com/trevorstele/index.html>



Bildo 3: “Flugi kun kakatuoj”, anglalingva eldono, eldonita de Mirador, Somerset, 2012



Bildo 4: “Flugi kun kakatuoj”, franclingva eldono, eldonita en 2013

La Malapero de la Bankizoj

De Kam Lee

Dum la Bonvola Kongreso en Melbourne en 2012 ni prezentis teatraĵeton kiun mi verkis. Mi intencis prezenti alian teatraĵeton kiun mi verkis antaŭ multaj jaroj, sed post kiam mi ĉeestis la prelegon de Jenny Bishop pri klimata ŝanĝiĝado mi inspiriĝis por verki alian teatraĵeton kiu rilatis al ĉi tiu monda temo.

La nomoj de la geaktoroj kaj rilataj roloj estas Indrani Beharry-Lall (Sciencistinto Dr-o Beharri-Lall), Bob Felby (Detektivo Bob Hobbit), kaj Kam Lee (Detektivo Kam Kvankam). Bob Felby ludis banĝan antaŭteatraĵetan muzikon.

La teatraĵeto temas pri du detektivoj, Bob Hobbit kaj Kam Kvankam. Ĉio komenciĝas kiam la estraro de la Unuiĝintaj Nacioj ricevis eltrudan leteron skribitan de la Societo de Mondaj Krimuloj. La eltrudantoj postulas ke tri bilionoj da dolaroj estu senditaj al ili post unu semajno. Rifuzo de la sendo de mono rezultos en plia malgrandigo de la nordpolusa glaciaĵtereno kaj tio konsekvence kaŭzos la translokiĝon de multaj blankaj ursoj el la Arkta regiono al Islando. Konsekvence, tia inundo de ursoj rezultos en la nuligo de la Universala Kongreso de Esperanto en Rejkjaviko en 2013. Bedaŭrinda afero kaj, tial, kion faros la estraro de la Unuiĝintaj Nacioj?

Rilata konata afero temas pri fama sciencistino, Dr-o Beharri-Lall, kiu spertas pri la scienco de fizikaj aspektoj de la mondo kaj kiu misterie malaperis du monatojn antaŭe.

La teatraĵeto komenciĝas en urba apartamento kie la du detektivoj neformale konversacias. Kam hazarde mencias sian lastatempan viziton al bazaro kie li renkontis ŝuovendiston kiu ege entuziasme provis vendi ŝuojn al li. Kam finfine aĉetis la ŝuojn, sed la maldekstra ŝuo sekrete enhavas bombon kiu estas programita eksplodi post kvar horoj!

La forpaso de kvar horoj post la aĉeto de la ŝuoj proksimiĝas kaj Kam malkovras la plilautiĝantan tiktakan sonon en unu el la ŝuoj. Kam suspektas bombon en la maldekstra ŝuo kaj li furioze provas forpreni la ŝuon sed li ne kapablas fari tion ĉar la ŝuo estas programita ŝrumpi dum la tempo de la eksplodo.

Nur minutoj restas kaj la detektivoj provas alian strategion kiu rilatas al sukcesa serĉo de granda sitelo. Ili sukcese trovas plastan sitelon kiu estas plena je akvo el krano. La maldekstra piedo de Kam kun ŝuo estas trempita en la sitelon kaj la tiktakan sono malaperas. La bombo estas malfunkciigita. Kia sensarĝiĝo!

Verŝajne, ĉio nun estas en ordo kaj ĉiuj surprizoj finiĝas, sed alia volvaĵo en la intrigo okazas! Neantaŭvidite, Kam trovas en la maldekstra ŝuo strangan helpleteron manskribitan de la malaperinta fama sciencistino. La letero diras ke ŝi estas enkarcerigita en proksima apartamenta ĉambro kies loko estas priskribita sur mapo. Kam kaj aliaj poste trovas la ĉambron de la enkarcerigita sciencistino, rompas pezan pordon, kaj finfine la sciencistino estas liberigita.

La eminenta Dr-o Beharri-Lall informas la detektivojn ke ŝiaj

eksperimentoj kaj rezultoj konkludas ke la mondo fakte signife varmiĝas pro homa agado. La detektivoj informas la estraron de la Unuiĝintaj Nacioj ke la eltruda letero ricevita de la Societo de Mondaj Krimuloj estas nur mistiko. La herooj rekomendas ke la estraro ne sendu monon al la diablaj krimuloj kaj anstataŭe, se eblas, uzu la monon por solvi la realan sciencan problemon de monda klimatsanĝiĝo.

Ekzemplero de la teatra teksto:

(Scenejo: Detektivo Bob Hobbit kaj Kam Kvankam nefomale sidas en ĉambro de apartamento.)

11) Bob: La ŝuoj aspektas tre vidagrablaj, sed ĉu vi aŭdas la “tik”-an sonon en unu el viaj ŝuoj?

12) Kam: Ĉu vi ŝercas? (La tik-sono komencis esti aŭdebla.)

13) Bob: Mi estas serioza.

14) Kam: Helpu min formeti la ŝuon el mia piedo. (Kam komencas paniki.)

15) Bob: Estas tre malfacila tasko, sed mi provas! (Ili ektenas la maldekstran ŝuon de Kam, dum Kam staras sur sia dekstra kruro. La tiksono de la bombo en la ŝuo plilaŭtiĝas.)

16) Bob: Ni ne sukcesis, sed mi havas alian ideon. Mi serĉas sitelon kaj plenigos ĝin kun akvo. (Bob furioze serĉas sitelon kaj post kelkaj sekundoj li sukcesas. La sitelo estas plenumita de akvo el krano. La ŝuo de Kam estas zorge metita en la akvon kaj la tiksono ĉesas.)

17) Kam kaj Bob: Sukceso! (La du detektivoj montras korpajn signalojn de sukcesa ekskapo el mortiga eksplodo.)

18) (Neantaŭvidite, Kam povas formeti la maldekstran ŝuon el sia maldekstra piedo.)

19) Kam: Kia ironia konsekvenco! Mi povas facile formeti la ŝuon el mia piedo. Kaj jen mesaĝo en la ŝuo. Eble vi deziras legi ĝin. (Kam donas la mesaĝon al Bob.)



Bildo 1: Fotitita dum la fino de la teatraĵeto kaj jes, ni iomete savis la mondon, Maldekstre al dekstre: Bob Felby (Detektivo Bob Hobbit), Indrani Beharri-Lall (Dr-o Beharri-Lall), kaj Kam Lee (Detektivo Kam Kvankam)

Raporto pri la Universala Kongreso de Esperanto en Islando

de Ŝandor Monostori

Dektri esperantistoj el Aŭstralio partoprenis la 98-an Universalan Kongreson en Rejkjaviko, ĉefurbo de Islando.

La islanda somera temperaturo estis tre simila al la melburna vintra temperaturo. Tamen evidentis ke estas somero ĉar vera nokto tute ne okazis. La suno subiĝis mezonokte kaj sekvis pli malpli unu hora krepusko-aŭroro antaŭ la



Bildo 1: La kongresejo en Rejkjaviko, Islando

baldaŭa sunleviĝo. Tio fakte taŭgis por celebrado kaj mi ofte vizitadis trinkejojn kaj drinkejojn kun malnovaj kaj novaj amikoj. La urbo estas sufiĉe malgranda; tiel oftis renkonti aliajn esperantistojn promenantajn surstrate.

Mi partoprenis ekskursojn ĉiutage kaj tiel mi povis praktiki Esperanton kun miaj kunvojaĝantoj kaj samtempe ni bone amuziĝis vizitante la belegajn lokojn de Islando. Ne estas miraklo ke oni ofte faras scienc-fikciajn filmojn en Islando, ĉar la pejzaĝo aspektas iom aliplanedeca.

La plej ĝueblaj programeroj de la Kongreso por mi estis la teatraĵoj, kaj la nacia kaj la internacia vesperoj.



Bildo 2: Dum la solena fermo

Ekskursoj dum la Universala Kongreso

Mi ekskursis ĉiutage kaj mi mencias nur kelkajn vidindaĵojn, kiujn mi trovis tre interesaj. La naturaj belaĵoj estas la rezulto de geografio. La eŭropa kaj nord-amerika tektonaj platoj renkontiĝas en Islando kaj ili disiĝas je rapideco inter 1 kaj 2 centimetroj jare. Tiel fendego duonigas la insulon kiun momente plenigas lafo, sed eble post kelkmilionoj da jaroj Islando dividiĝos kaj kreiĝos du apartaj insuloj. Islando havas multajn aktivajn vulkanojn kiuj elĵetas pli da lafo ol ĉiuj aliaj vulkanoj de la terglobo kune.

La plej interesa ekskurso estis al la Ora Cirklo kiu enhavas la grandegan akvovalon Gullfoss, gejseron Strokkur kaj la nacian parkon Þingvellir kie la fendiĝo de la insulo kreas kanjonon. La unua, subĉiela, parlamento (Alþing) okazis en Þingvellir inter 930 kaj 1798.

Verŝajne la plej fama loko estas la Blua Laguno (Bláa Lónið). La akvo elvenas el la tero kiel varmega vaporo kies energion



Bildo 3: Australiaj geesperantistoj ĉe akvofalo Gullfoss: Christine Hollis, Ŝandor Monostori, Jennifer Bishop kaj Alan Bishop

Bildo 4: Akvofalo Gullfoss - la scienc-fikcia filmo Prometheus komenciĝas ĉi tie



oni uzas por produkti elektran energion en la proksima elektrocentralo. Poste la akvo kolektiĝas en artefarita lago kiu nomiĝas Blua Laguno. La akvo aspektas kiel lakto ĉar ĝi enhavas silikaĵon kunmiksitan kun a l g o j . Onidire la akvo estas bonega por la haŭto kaj la banantoj plijuniĝas. La banado en la varma akvo (35 gradoj C) tre plaĉis al mi, sed mi ne certas pri la juniga efiko de la akvo.

Alia ekskurso klarigis kiel geoterma energio estas uzata. La plimulto de la domoj estas hejtataj pere de varmego akvo kiu post elteriĝo iras per tubegoj al la domoj. La elektra energio estas malmultekosta kaj abunda. Tiel, Islando produktas aluminon, kaj la plimulton de baŭksito vendas Aŭstralio al Islando.



Bildo 5: Erika kaj Charles staras ĉe akvofalo.

Bildo 6: Akvofalo Gullfoss



Komentoj pri la Universala Kongreso

Jenny Bishop, Charles Stevenson, kaj Allan Bishop intervjuitaj de Kam Lee

Mi intervuis kelkajn partoprenintojn de la Univerala Kongreso en Rejkjaviko kaj jen resumo de iliaj respondoj.

Jenny Bishop:

Mi konfesas ke ĉijare ni multe ekskursis por gajni verajn impresojn pri Islando. Ni faris du tuttagajn ekskursojn kaj du duontagajn. Fakte ni havis biletojn por plua duontaga ekskurso sed pro ĥora ekzercado ne eblis preni parton. Tiel ni donacis la biletojn al Indu kaj Barat, kiuj tre ĝuis trarigardadon de Rejkjaviko.

Niaj tuttagaj ekskursoj estis 'Ora Cirklo' kaj 'Sagaa Cirklo' kaj nia duontaga ekskurso estis 'Fajra Ringo'.

Mia plej memorinda travivaĵo estis vizito al Hengill, kie oni produktas la plej mediamikan energion, hidraterme kaj geoterme, kiu liveras elektron kaj varman



Bildo 7: La gejsero Strokkur ŝprucegas 30 metrojn alte en 5-minutaj intervaloj

Bildo 8: Kanjono en Þingvellir kie la tektonaj platoj dividiĝas



akvon al apudaj urboj, inkluzive al Rejkjaviko.

Mi certe volas mencii la belan kongresejon kaj la finan prelegon de Mark Fettes, la nova prezidanto. Je la fino de la ferma ceremonio, oni invitis la aŭdantaron manpremi kun la novaj estraranoj de UEA, kiuj poste staris ĉe la bazo de ŝtuparo ĉe la eliro de la aŭditorio.

Allan Bishop:

La nombro de kantistoj en la ĥoro estis inter 30 kaj 40, sed 55 kantistoj ĉeestis dum la unua provludo. La ĥoro havis reprezentantojn de proksimume 15 nacioj ĉefe el Skandinavio, Francio, kaj aliaj eŭropaj landoj.

La prezentado konsistis de "Stelo de Majo" (Islanda kanto) kaj ses ĉefe konataj kantoj kiuj estas "La lingvo por ni", "Jen nia mondo", "Cheriz flor", "Eŭropa himno", "Mirinda grac" kaj "Po Karikari".



Bildo 9: Erika staras antaŭ la Lutera Katedralo

Bildo 10: Aŭstralianoj festas



Laŭ kutimo ni kantis kanton de la lando kie okazis la Universala Kongreso. Tial, mi prezentis tre popularan Islandan kanton “Stelo de Majo” kiu temas pri la sento de la vintro kaj poste la brilo de la maja suno!

Mi estis la kondukisto de la ĥoro, kaj ni provis unu horo tage, escepte dum ekskursaj tagoj. Por mi defio estas ke diversaj kantistoj provis en diversaj tagoj; tial estis malfacile por la ĥoro same provi la tutan repertuaron!

La granda ŝtuparo meze de la kongresa konstruaĵo estis la loko de nia prezentado. Lunĉpaŭze ni kantis antaŭ proksimume cent aŭskultantoj. Multaj homoj rimarkis pri la bela sono.

Kantprezentado okazis sur la podio en la ĉefa halo por Internacia Arta Vespero, kiu inkluzivis prezentadojn de almenaŭ 8 diversaj internaciaj grupoj.

Charles Stevenson:

Rimarkinda parto de la insulo estas ebonaĵoj de lafo, kaj la plej granda parto de la tre granda insulo estas neloĝebla. Rejkjaviko estas pura, aktuala, kaj granda.

Tradiciaj Islandaj nutraĵoj estas fiŝoj, balenoj, kaj fraterkuloj. Mi parolis al kelkaj Islandaj Esperantistoj.

ESK dankas la fotistojn pro la donitaj fotoj, kiuj certe inspiras ĝojon.

Sandor Monostori: 1,2,3,6,8,11

Robert Budzul: 4,7,12

Heather Heldzingen: 5,9 kaj 10.



Bildo 11: Akvofalo Gullfoss

Bildo 12: La ŝtuparo, kie la ĥoro bele kantis dum kongresa lunĉpaŭzo. Ĉe ĉi tiu loko post la ferma ceremonio la nova UEA estraro manpremis kongresanojn.



Birdoj en mia ĝardeno

de Paul Green

Dum la Bonfara Kongreso 2013 en Melburno, Paul Green prezentis prelegon pri birdoj fotitaj en sia ĝardeno. Mi tre ŝatis la bildojn montritajn sur blanka muro kun akompanataj komentoj. Mi decidis intervjui lin kaj jen la rezulto:

1) *Kiam vi komencis foti birdojn?*

Mi komencis foti birdojn en 2011.

2) *Ĉu vi ŝatas foti birdojn pro specialaj kialoj aŭ cirkonstancoj?*

Observado de birdoj estas ŝatokupo mia dum multaj jaroj.

Kiam mi konstruis birdbanujon en la ĝardeno, specoj kiujn mi ne vidis antaŭe en tiu loko aperis. Do, mi akiris fotilon por registri la vizitantojn.



Bildo 1 (maldekstre): *Malurus cyaneus* (Blua maluo) sur branĉeto. Tre evidenta estas la helbluaj regionoj sur la kapo kaj supra parto de la birdo. Kiel moŝta ĝi staras, ĉu ne?!

Bildo 2 (dekstre): *Plectorhyncha lanceolata* (Stria mielmanĝulo) sur la rando de akva baseno, sed kion la birdo rigardas supren? Eble alia birdon, ĉu ne?



3) *Kiu estas la loko kie vi fotis la birdojn?*

Ni loĝas en vilaĝo kiu nomiĝas Oakey en sudorienta Kvinslando. Nia ĝardeno estas longa proksimume kvindek metrojn kaj larĝa kvardek metrojn. La fotoj estas de birdoj en la ĝardeno aŭ ekster la korto laŭ la kapablo de la fotila lenso.. Birdoj kiuj sidas sur aŭ en la birdbanujo estas sep metrojn for de la fenestro kie mi havas la fotilon.

4) *Kiam estas la plej bona horo por foti birdojn?*

Estas plej bona tempo kiam la lumo brilas sufiĉe. Tiam la detaloj kaj koloroj montriĝas plej bone.

5) *Kiujn librojn aŭ informon vi uzas por identigi la birdojn?*

Mi uzas "Field Guide to Australian Birds" de P. Slater, kaj "Complete Book of Australian Birds" de Reader's Digest. Mi uzas la libron de Ray Ross "Esperanta-Aŭstralia Vortaro de Aŭstraliaj Birdoj" por trovi la nomojn en Esperanto.

6) *Ĉu estas specoj de birdoj kiujn vi ne povas identigi?*

Ĝis nun, neniu.

7) *Kiu estas la plej granda birdo, kiun vi fotis?*

En la ĝardeno la plej granda fotita birdo estas la Piga Strepero –Strepera graculina.

8) *Kiu estas la plej strangaspekta birdo kiun vi fotis?*

Ne estas strangaspektaj birdoj en ĉi tiu loko.

Kam: Eble mi devus sekrete meti lirbirdon aŭ prahistorian pterodaktilon en via ĝardeno. Tamen, eble multaj homoj estus suspektemaj pri la aŭtentikeco de tiaj fotitaj birdoj, ĉu ne?!

9) *Ĉu estas specoj de birdoj, kiuj estas ofte viditaj en via parto de Kvinslando, sed ne en via ĝardeno?*

Bildo 3: *Zosterops lateralis* (Grizbrusta arĝentokulo). Tri grizblankflavaj birdoj sur la rando kaj tri sur horizontala maldika bastoneto. Eble okazas trinkpaŭzo dum kunsido pri serioza afero ĉu ne?!



Jes, estas multaj specoj de birdoj kiuj loĝas en la ĉirkaŭaĵo sed ili ne vizitas nian ĝardenon, ekzemple kelkaj papagoj, akcipitroj, birdoj kiuj bezonas akvon en riveretoj aŭ lagoj kaj aliaj specoj. De tempo al tempo tiuj birdoj flugas super la ĝardeno sed ne vizitas. Ankaŭ multaj specoj de birdoj estas videblaj eble kelkcent metrojn for de nia ĝardeno, sed ili evitas nian lokon.

10) *Ĉu estas pli facile foti inajn aŭ virajn birdojn?*

Laŭ mia sperto ne estas diferenco inter la du genroj kiam mi provas foti ilin.

11) *Kiom da birdaj specoj vi fotis?*

Ĝis nun mi fotis proksimume tridek birdajn specojn en nia ĝardeno.

12) *Ĉu okazis interesaj momentoj rilate al viaj fotadaj travivaĵoj?*

Bildo 4: *Dicrurus drongo* (Stelŝutita drongo) sur ligna horizontala bastoneto kvazaŭ ĝi serioze taksas la ĉirkaŭaĵon, ĉu ne?!



lun fojon mi fotis nekonatan birdon kaj mi uzis mian bildon por firme identigi ĝin.

13) *Ĉu vi apartenas al klubo por bird-fotantoj?*

Ne, mi ne aliĝis al klubo.

14) *Kiom estas la plej malproksima distanco por sukcese foti birdojn?*

Tio dependas de la grandeco de la birdo. Etaj specoj bezonas distancon de eble tri ĝis dek metroj kaj grandaj birdoj eble bezonas tridek metrojn por bona foto.

15) *Ĉu vi uzas teleskopan lenson dum vi fotas?*

Jes. Mi uzas lenson, kies interfokusa distanco estas tricent milimetroj. Oni povas teni tian fotilon en la manoj, sed oni ne nepre devus uzi tripiedan stativon por ĉiuj bildoj.

16) *Ĉu vi fotas aliajn objektojn krom birdojn?*

Jes, mi fotas aliajn bestojn en la ĝardeno – ekzemple lacertojn, insektojn, papiliojn kaj posumojn. Ankaŭ mi fotas indiĝenajn plantojn.



Bildo 5: *Anthrochaera rufogularis* (Dornvanga mielmanĝulo) sur supro de bariera stangeto. Ĉu la birdo konscias ke ĝi estas fotita?



Bildo 6: *Platycercus adscitus* (Palkapa rozelo), memfida birdo sur la akva baseno

Bildo 7: Maldekstre, *Manorino melanocephala* (Bruema manoreno), vigla amaso de dekkvar grizaj birdoj kun flavaj bekoj! Ne ofte okazas grupo kiu estas tiom densa en la malantaŭa korto.



17) *Ĉu vi kelkfoje metas nutraĵon apud la akva banujo por allogi birdojn?*

Mi neniam metis/as nutraĵon apud la akva banujo por altiri birdojn.

18) *Ĉu vi antaŭe konsideras ke eble estas rabobestoj (ekzemple katoj), kiuj vivas proksime al la birdbanujo kaj embuskas nesuspektajn birdojn? Kiel oni solvas tian problemon?*

Ni kaj niaj najbaroj ne havas katojn. La akva banujo estas en loko kiu ne havas arbustojn pli proksime ol ses metrojn. Tial, katoj ne havas kapablon embuski birdojn ĉe la banujo.

Mi dankas Paul pro lia bonvena partopreno kaj informplenaj respondoj. Sendube la legantoj de ĉi tiu artikolo ĝuos konsideri liajn komentojn kaj ĝui liajn bildojn tiom multe kiom mi ĝuas ĝin.



Bildo 8: Supre, *Platycercus adscitus* (Palkapa rozelo). Du birdoj (plejprobable paro?) sur akva baseno. Kiajn kolorajn flugilajn plumojn ili havas!

Por membroj de AEA:

Referendumo: ĉu la strukturo de AEA reŝanĝiĝu al enkorpigita asocio aŭ daŭru kiel ne-profitita kompanio?

En la jarkunveno en januaro 2014 dum la kongreso en Kanbero okazos speciala rezolucio por reŝanĝigi la strukturon de AEA al enkorpigita asocio, registri ĝin en Viktorio, kaj alpreni la novajn modelajn regulojn kiujn rekomendas Consumer Affairs Victoria (Reformleĝero de 2012 por la enkorpigado de asocioj).

Tiaj ŝanĝoj postulos plimulton de tri kvaronoj de la membroj voĉdonantaj por la speciala rezolucio aŭ per poŝta voĉdono aŭ en la jarkunveno.

Ĉi tiu artikolo konsistas el du argumentoj. La unua argumento verkita de Heather Heldzingen prezentas la vidpunkton de asocio. La dua argumento, verkita de Kam Lee, prezentas la vidpunkton de ne-profitita kompanio.

La estraranoj estas dividitaj pri la afero, sed plejmulto de ili subtenas reŝanĝi AEA-n al asocio. La propono por la ŝanĝo estas proponita de Heather Heldzingen kaj subtenita de Indrani Beharri-Lall.

Por enkorpitgita asocio:

Kiel vi ĉiuj scias, la strukturo de AEA estis ŝanĝita en 2008 de enkorpigita asocio al kompanio garantie limigita.

En tiu tempo okazis multe da debatado (iom tre akra) pri la ŝanĝo kaj ĝiaj konsekvencoj. Oni luis konsiliston je alta kosto, por doni konsilojn pri la plej taŭga strukturo por nia organizo. Lia konsilo estis ke ambaŭ strukturoj estas funkciigeblaj sed ke, pro la tiama politika atmosfero en la organizo, la tiama strukturo (enkorpigita asocio) retenatu. Tiu konsilo ŝanĝatis, post konsiderinda premo de la tiama prezidanto, kiu insistis ke ni ŝanĝu al kompanio garantie limigita.

Ankaŭ (senpaga) leĝista konsilo ricevis el la tiama Department of Consumer Affairs en Viktorio, kiu, ekzameninte la enspezadon kaj la aktivecojn de la organizo, forte konsilis ke AEA retenu sian staton de enkorpigita asocio. La estraro de AEA malatentis tiun konsilon.

El post la ŝanĝo al kompanio, la temporabaj kaj financaj kostoj por obei la novajn regulojn estis konsiderindaj. En 2008 oni verkis novan statuton, kiu montriĝis ne protekti la membrojn de neleĝaj eksigaj definitivaj kaj portempaj. Ĝi ebligis ke granda parto de la posedoj de AEA estu elspezita, kun la rezulto ke la sumo en la fondusoj nun multe malpliigis.

Unu el la debatoj pri la ŝanĝoj estas ke asocio ne rajtas vendi librojn ktp al ne-membroj, sed tio ne estas vera. Jen citaĵo de "Associations Incorporation Reform Regulations 2012, Section 68 – Source of funds":

"The funds of the Association may be derived from joining fees, annual

subscriptions, donations, fund-raising activities, grants, interest and any other sources approved by the Committee"

La plejmulto de la nuna estraro trovis ke sekvi la direktigojn de ASIC (Australian Securities and Investments Commission) estas tre temporaba kaj monraba. Ni trovis neniujn avantaĝojn por esti kompanio garantie limigita, sed ni scias pri pluraj avantaĝoj por reiri al la modelo de enkorpigita asocio, ekz.:

- pli granda leĝa protektado por la estraro de asocio (AEA pagis por ke antaŭaj direktoroj estu protektataj kontraŭ leĝaj procedoj)
- facileco de registrado de banksubskriboj post ŝanĝo de estraranoj
- malpli komplika kaj labordona jara raportado al ASIC
- manko da longaj kaj malfacilaj ASIC-procedoj post ŝanĝo de direktoroj
- malpli altaj financaj ŝarĝoj de ASIC.

Citaĵo de la Australian Centre for Philanthropy and Nonprofit Studies, Queensland University of Technology: „Disadvantages of a company limited by guarantee include:

- It is more expensive to register than an incorporated association
- Compliance with the requirements of the Corporations Act is more expensive and onerous than compliance with the Associations Act."

Kialoj por daŭro de neprofita kompanio

1) Subteno de nacia organizo anstataŭ ŝtatbazita organizo

La Esperanto-movado en Aŭstralio estas nacie bazita organizo, kies membroj fiere advokatas ke ili devenas el ĉiuj partoj de Aŭstralio.

Kompanio estas nacie bazita organizo kaj ne estas ŝtate bazita organizo. Se AEA nun estus asocio, ĝia formala nomo estus Aŭstralia Esperanto-Asocio de aŭstralia ŝtato ekzemple "La Esperanta Asocio de Kvinslando", aŭ de Sudaŭstralio, Viktorio ktp. Ĉu ano de NSK, SA ktp preferas esti membro de Viktoria asocio (aŭ Okcidenta Aŭstralia asocio ktp) aŭ nacia organizo?

2) Evito de problemoj rilate al malsamaj asociaj reguloj inter ŝtatoj

Kompaniaj reguloj samas tra la tuta Aŭstralia, sed tamen reguloj de ŝtataj asociaj povas malsami inter la diversaj Aŭstraliaj ŝtatoj. La laborŝarĝo de Direktoro de Administrado estas malpli granda dum AEA estas neprofita kompanio, ol se AEA nun estus asocio. Rimarku ke estas ses ŝtatoj en Aŭstralio; tial ses asociaj regullibroj devus esti legataj kaj obeataj.

3) Evito de asocio-rilataj problemoj kiuj nun kontraŭus la korespondajn kursojn kaj refunkciigon de AEA-libroservo.

Kompanioj en tuta Aŭstralio povas vendi librojn (ekzemple vortarojn), ESK-gazeton, esperantajn kursojn, flagojn, CD-ojn ktp al membroj de AEA, nemembraj esperantistoj, kaj nemembraj komencantoj, interesantoj, lernejoj kaj aliaj.

Komplikaj aferoj okazos se AEA reŝanĝiĝos al asocio. Asociaj reglamentoj de

ĉiu ŝtato pri vendo al asociaj nemembroj devas esti obeataj. En Viktorio, ekde la komenco de novembro 2012 asocioj en Viktorio havas permeson por fari multajn komercajn agadojn. Tamen, asocioj en Novsudkimrujo rajtas vendi komercaĵojn nur al asociaj membroj.

La restarigo de la AEA-Libroservo trafus la sekvantajn problemojn se AEA nun reŝanĝiĝos al asocio.

3a) Laborantoj de la NSK-libroservo ne rajtus vendi librojn al ne-membroj de AEA kaj eĉ ne al ne-membroj de AEA en Viktorio.

3b) Laborantoj de la libroservo en Viktorio ne rajtus vendi librojn al ne-membroj de AEA en NSK.

3c) Laborantoj de la libroservo devus kontroli la membrecan statuson kaj loĝŝtaton de ĉiu kliento (ekz. ĉu la kliento estas ne-membro de AEA kiu loĝas en NSK? ktp)

3ĉ) Malsimpla reklamada agado devus esti planita por la vendo de komercaĵoj.

Laŭ simila logiko, estus kontraŭleĝe por ne-membroj de AEA en NSK aĉeti korespondajn kursojn de AEA.

Ĝenerala informo pri kompaniaj administraj aferoj de AEA:

a) La registrado de novaj direktoraj banksubskribantoj post ŝanĝo de estraranoj estas facila kaj rapida se la registro de ASIC estas ĝisdata. Bankoj povas facile kontroli la nomojn kaj personajn informojn de la direktoroj per la retejo de ASIC.

b) La informo pri AEA kiun ASIC bezonas: i) financa raporto ii) nomoj kaj personaj informoj de la direktoroj kaj kompania sekretario. La sendo de raporto de ĝenerala jarkunsido ne estas bezonata.

c) La ASIC-kotizo konsistas el jara registra kotizo kiu estas \$43.00. Monpunoj eblas pro malfrua pago de jara registra kotizo aŭ malfrua sendo de financa jarraporto.

Interesa evento en Nepalo

La Nepala Esperanto-Asocio organizas 12-tagan ekskurson de la 6-a ĝis la 17-a de marto al famaj nepalaj turismaj lokoj. La kotizo estas sufiĉe malmultekosta - nur 750 eŭroj por persono (transportado, manĝado, loĝado en dulita ĉambro en bonkvalitaj hoteloj, kaj eniro al diversaj lokoj). Detaloj ĉe www.esperanto.org.np.



Tradiciaj manĝaĵoj el Nepalo



Pejzaĝo de Nepalo

Nekrologo:

GASKELL, Anthony John
(Novsudkimrujo, Manlio)
18-5-1940 ĝis 30-1-2013
Bonhumora mondkonscia
esperantisto kiu donis multe al la
Esperanta celo.

(Detaloj en Aŭstraliaj Esperantistoj, 9-2-2013,
eldono 98)

HELDZINGEN, Ivan Wayne
(Viktorio, Melburno)
23-11-1943 ĝis 10-3-2013
Pasia esperantisto, lingvisto,
instruisto, klerulo kaj sincera amiko
(Detaloj en Aŭstraliaj Esperantistoj, 8-3-2013
eldono 102 and 15-3-2013, eldono 103)

BANTICK, Eric John (Tasmanio,
Hobarto)
23-3-1916 ĝis 17-6-2013
Amiko de kuraĝoj kaj kredo en la
boneco de la homaro.

GRANT, Alan (Kvinslando,
Brisbano)
17- 6-1924 ĝis 18-6-2013.
Brisbana esperantisto mortis pace
en sia dormo je la aĝo de 89. Alan
estis aktiva en la Brisbana klubo
dum la sesdekaj jaroj. Liaj tri
infanoj Jay, Kay kaj Robert estis ĉe
lia flanko.

SMART, Philip Robert (Viktorio,
Melburno)
17-08-1951 ĝis 23-11-2013
Amiko kaj aprecita membro de la
Melburna Esperanta movado.



New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
nzea@esperanto.org.nz
0800 350 781

Chris Krägeloh | President
chris.krageloh@gmail.com

Bradley McDonald | Vice-President
Bradley.m@woosh.co.nz

David Ryan | Treasurer
ryangomez@xtra.co.nz

Howard Gravatt | Secretary
hgravatt@ihug.co.nz

Erin McGifford | Committee Member
erinmcgifford@iconz.co.nz

Rouan Van Ryn | Committee Member
a.tkanek@gmail.com

Ivan Pivac | Committee Member
ivan@zabonne.co.nz

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, answering queries from the



Australian Esperanto Association

Esperanto House
143 Lawson Street
Redfern NSW 2016
Australia

www.esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
+61 (07) 4634 7312

Sandor Horvath | President
prezidanto@esperanto.org.au

Kam Lee | Administrative Director
admin@esperanto.org.au

Heather Heldzingen | Financial Director
financoj@esperanto.org.au

Indrani Beharry-Lall | Director of
Member Services
servoj@esperanto.org.au

Margaret Chaldecott | Director of
Promotion
informado@esperanto.org.au

- | Director of
Education
edukado@esperanto.org.au

- | Director of
Implementation
utiligado@esperanto.org.au

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto

